

**2003
alportu
por vi
ĝojon kaj
feliĉon!**



**INTERNACIA ESPERANTO-RIVISTO
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ**

ILEI

DECEMBRO 2002

N-ro 4 (103)

Pri la lingv'ajo
kaj ortografio de



Sen pied'notoj ni uzas la plej oftajn 1500 vort-radikojn, kiuj estas trov-eblaj en la hejm'paĝo de Juna Amiko: <http://www.junaamiko.inf.hu>

Krom-signoj, kiuj helpas komenc'antojn:

Divido-streko (-) troviĝas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri...

Vertikala strek'eto (') signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'iĝi...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto re-venas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komenc'anto (esperantisto, patrino...) ni ne uzas kromsignon.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.



Sur la titol'paĝo:

Karina MACGILL

kun siaj kobajoj

Vidu ŝian

artikolon sur paĝo 11.

“Ĉu esti aŭ ne esti?”

Jen la demando Hamleta. Estas mal-agrable, ke nun, kiam ni estas komenc'ontaj la 30-an jar'kolekton de Juna Amiko, ni devas star'igi la supran krudan demandon: Ĉu plu el-doni nian revuon aŭ ĉes'igi ĝin?

Sciu, ke en la nuna jaro – la unuan fojon post multaj antaŭaj jaroj – la abonoj¹ ne kovris la el-spezojn presajn kaj, ĉefe, af-rankajn². Kaj ĉiu scias, ke kun deficino³ neniu gazeto povas daŭre ekzisti.

Kio sekvas el la supraj konstatoj? Du far'endoj tut'certe. Unue kaj antaŭ ĉio, la redakcio kaj la tuta esperant'ist'aro devas serioze re-konsideri la redaktajn principojn⁴ kaj for-ĵeti ĉion, kio montr-iĝas eks-mod'iĝ'inta kaj kuraĝe ek-iri tute novan vojon, se necese.

Ali'flanke, ne mal-pli gravas pri-konsideri, ĉu nia membr'aro bezonas la revuon, kiu intencas kaj fakte edukas novajn generaciojn⁵, kiu celas doni lingve kaj en-have sen-riproĉan materialon.

Bon'volu re-konsideri ĉion ĉi kaj helpi. Helpi per sinceraj kritikoj kaj konsiloj, kiujn ni ĉiam akceptas kun plen'kora dankemo, kaj helpi en ĉiuj formoj de reklamado kaj ne laste, abonu nian revuon al vi kaj viaj lernantoj, pro kio anticip'e⁶ dankas

Geza Kurucz
redaktoro

1. aboni: antaŭ-pagi tutan jar'kolekton de gazeto / 2. el-spezoj por la poŝto, liver'ado / 3. mon'perdo en komerco / 4. plej gravajn ideojn / 5. generacio: sin-sekvo de pli-malpli sam'aĝaj homoj / 6. antaŭe.

Iam, simio¹ hav'igis al si spegulon. Sci'vole ĝi rigardis en la spegulon kaj pensis, ke la figuro en ĝi havas komikan² vizaĝon. Do, ĝi rid'et'aĉis; nature, la figuro ankaŭ faris la samon. Sed la simio opiniis, ke la est'aĵo mokas ĝin. Tial ĝi ekkoleris. Nun la re-spegul'aĵo ankaŭ ŝajnis kolera kaj, laŭ la simio, kruel'ega³. La simio timis kaj pensis, ke la besto en la spegulo estas danĝera. Tim'ema ĝi retro-iris kaj la besto en la spegulo ankaŭ faris tiel. Do, la simio rid'etis; la alia ankaŭ ridetis.

Ĉar la estaĵo en la spegulo ridetis, ĝi opiniis, ke la besto ankaŭ estas bon'kora. Feliĉa, ke ĝi trovis bonkoran amikon, ĝi prenis kun si la spegulon.



1. hom'simila besto / 2. rid'igan / 3. mal-mild'ega.

La mondo estas kiel spegulo. Ridetu al la mondo kaj ĝi ridetas al vi. Koleru kontraŭ la mondo kaj ĝi koleras kontraŭ vi. Sekve, restas en niaj manoj la povo amik'iĝi aŭ malamikiĝi.

S-ino SARANATH, Hindio

SAGAJ VORTOJ el la **Domfabriko** de A. CSISZÁR kaj K. KALOCSAY

Konfido naskas konfidon.

Kiu fosas sub alia, falos mem en la foson.

Amiko de amiko estas ankaŭ amiko. Amiko fidela estas trezoro plej bela.

Knabo, kiu fariĝis

NACIA POETO DE FINNLANDO

Riam li naskiĝis oni ne skribis per glob'krajono, nek tajpis¹ komputile, sed skribis per veraj plumoj de bird'egoj.

La knabo naskiĝis la 5-an de februaro 1804 en malgranda svedlingva haven'urb'eto *Jakobstad*, finne *Pietarsaari*. La lando, kiun nun-tempe oni konas kiel Finnlandon kaj kies nacia poeto² la knabo poste fariĝis, ankoraŭ ne ekzistis.

Ĝin oni konis nur kiel mal-pli gravan parton de la reĝ'lando Svedio, al kiu ĝi apartenis de pli ol 500 jaroj.

La knabo ek-havis la nomon *Johan Ludvig* [Juhan Ludvig]. Lia familia nomo estis *Runeberg* [Runeberj]. Lian jun'aĝon influis milito inter Svedio kaj Rusio. La lasta venkis kaj ek-posedis Finnlandon. Tion, kion Johan Ludvig aŭdis kaj tra-vivis en sia infan'aĝo, kiel plen'kresk'ulo li uzis en artikoloj, rakontoj kaj poemoj por igi la finnojn pli kaj pli konsciaj pri sia finn'eco. Kvankam li lernis kaj verkis en la sveda, liajn librojn legis la tuta lando. Oni tra-

dukis ilin en la finnan.

Riam Johan Ludvig estis infano, li lernis skribi kaj legi en tre modestaj kondiĉoj. Dum la ferioj li ŝatis fiŝ'kapti, migri aŭ skii⁴ en arbaroj kaj herb'ejoj, kie li konat'iĝis kun plantoj kaj bestoj.

Tridek somerojn li pas'igis en eta fiŝ'kapt'ista kaban'eto⁵ kun la patro, onklo kaj – poste – kun siaj propraj filoj, kaj la kabaneto fariĝis lia plej kara loko en la mondo. La kabaneton liaj admir'antoj kaj amikoj restaŭris⁶ kaj nun ĝin vizit'adas busoj plenaj de turistoj. Ĉar mankis taŭga lernejo en lia hejm'urb'eto, ek-de la 9-a vivo-jaro Johan Ludvig devis loĝi ĉe parencoj aŭ geamikoj por vizit'adi tie veran lernejon kaj, poste, ek-studi en universitato⁷.

Frua paraliz'igo⁸ de lia patro tamen interrompis la studojn kaj li dung'iĝis kiel instruanto ne lerneja sed hejma “gubernanto” ĉe du nobelaj⁹ familioj, en malgranda vilaĝo de centra Finnlando. Tiel li povis mone helpi al siaj ge-patroj kaj ge-fratoj. Li konat'iĝis kun la mal-facilaj vivkondiĉoj kaj la animo de la finne



parol'anta popolo. Tiuj konoj kaj sentoj aper'adis poste en liaj verkoj. La popolo amis lin, ĉar ĝi trovis sin mem en liaj verkoj. Runeberg montris kiel fidela, labor'ema kaj brava¹⁰ estas la popolo. Li kontribuis al la finna emo sendepend'iĝi kaj de Rusio kaj de Svedio. Kler'uloj nun komparas lin kun la grandaj verk'istoj de aliaj eŭropaj landoj: *Hugo, Lamartine, Shelley, Keats, Puŝkin, Lermontov, Mickiewicz, Petŝofi, Eminescu...*



Johan kreskis en granda familio

Li edz'in'igis sian kuz'in-on *Fredrika*. La juna familio loĝis, unue, en *Helsinki* (svede *Helsingfors*), poste en *Porvoo* (svede *Borga*). *Fredrika* estis inteligenta¹¹, bone eduk'ita, sciis multajn lingvojn, emis verki, sed dediĉis sin al la edzo kaj iliaj ses filoj. La patro instruis la latinan kaj grekan en la lernejo, kiun li komencis ankaŭ estri. Hejme li verkadis siajn librojn kaj artikolojn. La patrino respond'ecis pri la ĉiu-taga komforto kaj ordo. Al-done ŝi laboris kiel sekretariino¹² por sia edzo.

Runeberg paraliz'iĝis en la aĝo de 59-60 jaroj. *Frederika* fleĝis lin hejme dum 13 jaroj, laŭtleĝis por li en pluraj lingvoj dum mult'egaj horoj kaj zorgis pri la gastoj, kiuj daŭre vizit'adis la hejmon pro la famo kaj klara penso de la mastro. La hejmo ankoraŭ nun-

tempe restas en sia tiama stato kaj akceptas mult'nombrajn vizit'ant-ojn, kiuj venas por vidi, kiel vivis la fama verkisto kaj nacia poeto, J.L.Runeberg.

La 5-an de februaro finnoj ĉiujare festas *Runeberg-on*. Tiam oni faras aŭ aĉetas kuk'etojn, kiujn oni nomas *Runeberg-kuketoj*, ĉar oni supozas, ke *Johan Ludwig* pleje ŝatis ilin.

Raita Pyhälä, Finnlando

(Dankon al sved'lingva finn'landa verk'ist'ino Wawa Stürmer, kies ĉarma libr'eto pri la infan'aĝo de Runeberg aperis en Jakobstad/Pietarsaari en 2001, por celebri¹³ la 350-jar'iĝon de la urbo. La libreto estis dis-don'ita al ĉiuj tieaj lernej'anoj aŭ en la sveda aŭ en la finna.)

El inter la multaj verkoj de J.L. Runeberg jen lia, eble, plej populara poemo, al kiu muzikon komponis *F. A. Ehrström* en la 1830-aj

jaroj kaj esperant'igis ĝin Hannes Koivu. Daŭre amas kaj kantas ĝin multaj finnoj en la sveda, finna aŭ Esperanto.

Ĉe fonto

*Rigardas mi admire vin ho brila, pura font',
kaj vidas, kiel movas sin impona¹⁴ nuba mont'.*

*Kaj jen alia kiel or' flam'egas en re-bril'.
Sed tuj ĝi flugas ree for per venta laflug'il'.*

*Simile en anima font', en reva¹⁵ homa kor',
bril'etas la trezora¹⁶ mont', sed trompas falsa or'.*

1. maŝin'skribis / 2. poem'verk'isto / 3. efikis sur lin / 4. iri sur neĝo per longaj tabul'etoj sub la plandoj / 5. tre simpla dom'eto / 6. re-nov'igis / 7. la plej supera lernejo / 8. perdo de povo sin movi / 9. de altaj de-venoj en feŭda soci'ordo / 10. kuraĝa, sen-tima / 11. saĝa kaj multe-scia / 12. afer'gvid'anto / 13. publike festi / 14. respekt'inde granda / 15. revii: imagi ion forte dezir'indan / 16. alt'valora, riĉ'en-hava.

Majk SADLER

Eĉ guto malgranda

*Estas strange, kurioze¹, tamen estas fakto:
mal-aperis el la taso mia bona lakto.
Kiu trinkis mian lakton el la tas' sur tablo?
Mal-ver'sajne kulpas kaktos² pri la mal-agrablo!*

*En angulo sidas kat' serene³, sankt'miene;
mi rigardas kun sever' - angelas⁴ ĝi sen-ĝene;
sed perfidas⁵ vango-haro - jen, ho, blanka guto!
Kuru kato! Se mi trafos, helpu paraŝuto⁶!*



1. ekscite interese / 2. dorno-plena planto (vidu la bildon!) / 3. tre trankvile / 4. anĝelo: loĝ'anto de la ĉiellando / 5. mal-kaŝas la veron / 6. grand'ega ombrelo por sur-ter'iĝi el granda alt'eco.

ESTU PACO, REGU AM'

Teksto: Anja Karkkainen

Muziko: Vesa Pölkki

Musical score for the song "Estu Paco, Regu Am". The score is written in G minor (three flats) and 3/4 time. The tempo is marked as quarter note = 105. The key signature is G minor. The score consists of five staves of music with lyrics underneath. Chords are indicated above the notes: C7, D7maj7, Fm, Bbm, Eb7, Ab, D9, and Fm. The lyrics are in Esperanto. The score includes measure numbers 5, 9, 13, 17, and 21. There are repeat signs and first/second endings indicated.

Krist-nask-
ar - bo al - ta stu - ras kun stel - et - o sur la pint'. Bon - o -
do - ron o - ni fla - ras de fran - daj kaj hi - a - cint'. Bon de -
zi - ras kart', do - na - co, or - ru - band', kan - de - la flam',
ke sur te - ro es - tu pa - co, ke sur te - ro re - gu am'!
am'!

Krist'nask'arbo alta staras
kun stel'eto sur la pint'.
Bon'odoron oni flaras
de frand'aj' kaj hiacint'.
Bon'deziras kart', donaco,
orruband', kandela flam',
ke sur tero estu paco,
ke sur tero regu am'!

Amuz'iĝas ĉe la arbo
ĉiu sam'familian'.
Beb', infan', old'ul' kun barbo
ronde dancas man' en man',
kun rid'eto sur vizaĝo,
laŭ kant'ad' en gaja gam'.
Sur la tero estas paco,
sur la tero regas am'.

Venas Sankta Nikolao,
ruĝ'vest'ita, dika gast'.
De kabano al vilao
rapid'egas li kun hast'.
El la sledo de boaco
li salutas per proklam':
Sur la tero estu paco,
sur la tero estu am'!

Ĝis post horoj nokto-mezaj
daŭras fest' laŭ tradici',
la palpebroj iĝas pezaj
al et'uloj pli kaj pli.
Ek-dorm'onte jam pro laco
flustras ili en pijam':
Sur la tero restu paco,
sur la ter' plu regu am'!

A	U	N	U	A	E	T	A	G	O
L	Rubriko por la plej et-aĝaj esperantistoj				Verk'ita de Stefan MacGill kaj liaj filinoj Karina kaj Hajnal				
stefan.macgill@galamb.net									



MATEMATIKLE

Sinjoro Rakci (*estas severa sed entuziasma instruisto de matematiko. Li skribas malfacilan taskon sur la tabulo kaj legas ĝin al la klaso*): Jen via tasko, klas'anoj. Du kaj tri kvaronoj plus naŭ kaj sep okonoj minus kvar kaj okono.

Lernejestro (*aperas ĉe la pordo*): Olaf, bon'volu veni kun mi por kvin minutoj.

Rakci: Ĉerte. (*Al la klaso*) Klaso, dum mi for-estos, vi solvu la taskon sen mi. Havu la respondon preta, kiam mi re-venos! (*Li eliras.*)

Klas (*ordon'ema lernanto*): La instruisto eliris, do nun mi estos la instruisto.

Ken: Bone, ni ludu lernejon. Vi estu la instruisto, kaj ni estos la lernantoj.

Klas: Do, ĉu ni serĉu solvon por la problemo?

Jan: Ne, ne! Ĝi estas tro malfacila. Mi abomenas¹ frakciojn².

Pers: Ni ne serĉu, prefere ni ŝercu!

Haver: Jes, ŝercoj! Ŝercoj estu la

leciono! Amuza stud'horu!

Klas: Bone. Mi estas severa instruisto. Ĉiu infano devas rakonti unu ŝercon.

Ken: Instruisto! Instruisto! Mi havas bonan ŝercon!

Klas: Akcept'ite. Ken, rakontu vian ŝercon! Pri kio temas?

Ken: Pri matematiko. (*Ĉiu ĝemas.*) Pri matematika instruisto. (*Ĉiu malĝemas.*)


Klas: Do, rakontu! Kiel nomiĝas la instruisto?

Ken: Ŝi nomiĝas s-ino Namis. Jerezo Namis. Sed tio ne gravas. Komence de la leciono ŝi diras: "Lernantoj, sciuj! En la mondo ekzistas tri tipoj da matematikistoj! Tiuj, kiuj sci'povas kalkuli kaj tiuj, kiuj ne." (*Silento.*)

Ken: Do, fino de la ŝerco. Ridu! (*Iu ridas, poste kelkaj ridas, fine ĉiuj ridas.*)

Klas: Dankon pro via ŝerco. Kiom da poentoj por tiu ŝerco?

Mia: Mi donas sep el dek. (*Ĉiu vid'igas poent'uman ŝildon kiel*



en art'ismaj sportoj.)

Save: Malpli! Tiom bona ŝerco ĝi ne estis! Mi donas kvin poentojn el dek.

Lev: Mi donos kvin kaj duonon. Ĉu mi rajtas doni duon'poenton?

Laci: Jes, ni rajtu. Mi donos ses kaj duonon. (*Vid'eblas kvar ŝil-doĵ.*)

Klas: La kvar juĝ'istoj decidis: Sep, kvin, kvin kaj duono, ses kaj duono. Sume... Average³... Nu, hmm... Ve, kie mia kalkulo? Kie mia cerbo... ?

Jens: ...sume dudek kvar, dividu per kvar, do average ses poentoj!

Klas: Dankon, Jens! Kiu havas alian ŝercon?

Pers: Mi! Aŭskultu! Tri statistikistoj iris ĉasi. Ili vidis sovaĝan cervon⁴ en la arbaro. La unua pafis. La kuglo flugis preter la cervo, tri metrojn tro mal-dekstre. La dua pafis. La kuglo preter-flugis tri metrojn tro dekst-

re. "Hura!" kriis la tria statistikisto, "Ni trafis ĝin!" 2

Haver: Tre sprite! Amuze! Naŭ kaj duono. (*Li levus poento-karton.*)

Lev: Mi konsentas preskaŭ. Naŭ poentojn mi donas (*levus karton*).

Mia: Ok. Ne pli ol ok (*levus sian karton*).

Seve: Sep kaj duono. Mi jam aŭdis ĝin.

Jens: Sume ... tridek kvar, dividu per kvar, do average... hmm ... hmm... (*laŭte, triumfe*⁵) ok kaj duono.

s-ro Rakci (*revenas subite*): Kion vi kriis, Jens?

Jens: Nenion, sinjoro.

Rakci: Mi aŭdis vin diri ion – krii ion –, kion vi diris?

Aktoru la skeĉon!

Vi bezonos dek unu rol'ulojn, el kiuj naŭ estas lernantoj. Jen la familiaj nomoj de la lernantoj, en alfabeto ordo (kiel konvenas en lernejoj!). Kiu estas kiu?

Areg, De Kart, Dikt, Ferdon, Jugoĵen, Ombre, Prit, Rataks, Umig.

ŜERCO

ŜERCO

de Hajnal
MACGILL



Homo en prizono¹, kiu scias, ke ĉiuj leteroj iras tra cenzuro², ricevas leteron de la edzino: "Kara, kiam mi plantu la ter'pomojn?" – demandas la edzino. La prizono skribe respondas jene: "Ne fosu la ĝardenon por la terpomoj, ĉar tie estas la en-ter'ig'itaj arm'iloj!"

Post kelkaj tagoj lia edzino respondas: "Ses detekti-vo³ venis al nia domo kaj sen-manke tra-fosis la ĝardenon, sed nenion trovis!" La prizono skribis responde: "Nun vi povas planti la terpomojn!"

Stultur'ano al-venas mal-frue al la teatro. La gvid'ist'ino diras al li:

– *Sinjoro, jam de dudek minutoj la teatr'ajo komenc'iĝis. Mi petas, ke vi okupu vian sid'lokon tre silente.*
– *Kial? Ĉu ĉiu jam dormas?*

Okazis tertremo en Kalifornio. La tuta familio Lerende trans-vivis, sed ilia domo dis-falis. Dum ili serĉis por si alian, ili decidis forsendi la infanojn al parencoj. Onklo Bunko vivas en eta vilaĝo en la Apalacia mont'aro, en la alia flanko de Usono. Ili sendis, do, telegramon. " Ni suferis tertremon. Ni sendas nian filon Keneto."

Post tri tagoj venis responde telegramo: "Ni re-sendas vian filon. Sendu prefere la tertremon!"

1. malliber'ejo / 2. prizona kontrolo de skrib'ajoj / 3. kaŝ'poloc'istoj.

◀ Daŭrigo de MATEMATIKLE (paĝo 9)

Jans (*honte*): Ok kaj duono.

Rakci: Bonege! Brave! Gratulon!

Mi apenaŭ kredis, ke vi solvus la problemon! Mi eĉ ne kredis, ke vi rigardus ĝin. Kiom diligentaj vi estas! Premio por la tuta

klaso. Glaci'kremo vendrede! Jes, la ĝusta respondo estas: ok kaj duono. (*Li skribas ĝin grand-litere sur la nigra tabulo, ĉar hazarde ĝi estas la ĝusta solvo de la matematika tasko.*)

1. mal-am'egas / 2. nombrojn, kiuj ne estas divid'eblaj per unu sen manko, kiel ekzemple: 0,3 ; 1/2 kaj aliaj / 3. mez'nombro / 4. grandan ĉas'beston kun bela korn'aro / 5. triumfo: glora venko; ĝoj'ego pro brila sukceso.



Sovaĝaj kobajoj vivas en la centra parto de Sud-Ameriko, en la Andaj montoj, la pampoj (herbaj ebenaĵoj) kaj apud la brazila marbordo. Ekzistas kvar ĉefaj specioj. Kobajoj havas pli grandajn parencojn.

Karina MacGill

ĈIO INTERESA PRI KOBABOJ

Kobajoj povas vivi ses ĝis ok jarojn ĉe bonaj kondiĉoj kun bona pri-zorgo. Kobajinoj povas naski idojn ekde la aĝo de ses monatoj. Kutime naskiĝas unu ĝis

kvar idoj sam'tempe. La idoj restas en la panjo 64 kaj 68 tagojn.

Bonaj amikoj de kobajoj estas kunikloj. Ili povas kun-vivi en komuna kaĝo. Oni povas trejni hundojn kunvivi pace kun kobajoj. Malamikoj de sovaĝaj kobajoj estas serpentoj, leon'idoj, hienoj kaj agloj.

Kiam ili estas dorlot'bestoj en kaĝoj, necesas doni al ili ŝtonojn kaj branĉojn, ĉar ili estas ronguloj, ili devas regule rongi. Sen tio iliaj dentoj kaj ungoj povas mis-kreski kaj infektiĝi.



Kobajoj manĝas preskaŭ ĉion: semojn, grenojn, fruktojn, legomojn... Ili trinkas akvon. Kobajino havas nur du mamojn, ĉar la idoj bezonas nur malmultan lakton. Jam de la naskiĝo ili manĝas tion, kion plen'kreskaj kobajoj.

TRI DEZIROJ

Nasredin Hodja inter-parolis kun du amikoj en bazaro¹. Baldaŭ aperis luksa kaleŝo². La koĉero³ halt'igis la ĉevalojn apude kaj la ĉef'veziro⁴ el-kaleŝ'igis. Vid'inte iliajn mizerajn vestojn, li diris:

“Hodiaŭ mi havas bonan humoron. Pro tio mi plen'umos po unu el viaj deziroj. Diru, do, kiom vi deziras.”

“Ho, mi deziregas havi propran palacon⁵!” diris unu el la amikoj de Hodja.

“Bone”, kapjesis la ĉefveziro.

“Mi revas pri luksa kaleŝo, kia estas la via!” vort'igis sian deziron la alia amiko.

“Estu tiel!” diris la ĉefveziro.

“Mi dezirus ricevi unu fiŝon”, diris Hodja modeste.

“Al-portu al li fiŝon!” ordonis la

ĉefveziro al la serv'istoj kaj li promenis plu.

Kiam la ĉefveziro jam estis for, la amikoj ek-riproĉis Hodjan:

“Ĉu vi frenez'igis? Eble neniam en la vivo vi havos similan okazon kaj vi for-ĵetis vian bonŝancon por unu fiŝ'aĉo.”



“Vi estas stultaj⁶ kaj rev'emaj”, diris modeste Nasredin. “La ĉefveziro neniam donacos al vi palacon, nek kaleŝon. Li ne estas freneza. Sed la fiŝo, kiun mi petis, jen vidu, jam estas port'ata.”

Tradukis: Elizabeta RAJTMAR

1. loko por vendi al aĉet'antoj / 2. bel'ega ĉaro / 3. vetur'ig'isto de kaleŝo / 4. iama islama ĉefministro / 5. belega, luksa dom'ego / 6. mal-saĝaj.

KONTAKTO

Du-monata soci'kultura revuo de TEJO
Abonu ĝin. Vizitu ĝian TTT-ejon:
<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>

Moderna¹ fabelo

Ruĝa Ĉap'eto² al-venis al la av'ino kiu, kovr'ita ĝis la mentono, ankoraŭ dormis en la lito.

– Avinjo, kial vi kuŝas antaŭ-tagmeze en la lito?

– Mi estas laca, nep-in'eto mia.

– Kaj kial viaj okuloj estas tiel ruĝaj?

– Ĉar mi komputil-umis tutan nokton.



1. nun-tempa / 2. fabela hero'ino kon'ata pro sia ruĝa ĉapeto.

Kuireja invent'aĵo

Ĉu vi ankoraŭ viŝas viajn lav'itajn kuirejajn vazojn per tuko? Finnoj preskaŭ tute liber'iĝis de tiu ĉiu-tag'aĵo, ĉar la kuireja ŝranko super la lav'tablo en-havas kradojn, sur kiuj

la lavita uj'aro sek'iĝas, glaso kaj taso-
soj renvers'itaj kaj teleroj star'ig'itaj
sur la rando en V-forma krado tiel: // //
aŭ tiel ĉi: \ \ \, por ke la akvo povu el-
gut'adi sur la suban metalan platon.



La sek'igo-ŝrankon el-pensis invent'ema finnino Maiju Gebhard (1896-1986). Unue, la gut'ig-ado-bretoj estis el ligno, sed nun-tempe el metalo. Ili estas kovr'itaj per blanka plasto. Kompen'eble aĉet'ebles ankaŭ maŝinoj por lavi vazojn, sed ili multe-kostas kaj bezonas spacon. Dankon al sinjorino Gebhard, mi nun ver-kis ĉi nov'aj'eton kaj ne dommastr'umis.

Raita Pyhala, Finnlando

Spomenka Štimec

ESPERANTO NE ESTAS NUR LINGVO

ZM

ZAGREBA METODO



Unu lerno-libro tra la tuta mondo

ZAGREBA METODO

(Baz'ita je komput'ila esploro pri la plej oftaj vortoj de la parol'ata Esperanto)

La Zagreba metodo konsistas el:

- baza lernolibro en 12 lecionoj
- kaseto kun lecionoj kaj kantoj el la lernolibro
- bild'strio **Kiu estas Jozefo?** (aŭtoris *Johano Valano*)
- instrukci'aro por kurs'gvid'antoj (aŭtoris *Zlatko Tišljar*)
- Broŝuro **Esperanto ne estas nur lingvo** (aŭtoris *Spomenka Štimec*)
- daŭr'iga B-kurso (aŭtoris *Spomenka Štimec*)

La baza lernolibro hav'ebblas en jenaj lingvoj:

angla, germana, kroata, franca, kirunda, Esperanta, itala, hungara, malta, korea, portugala, japana, kataluna, makedona (prepar'ataj en la rusa, pola, finna).

En la unuaj ses lingvoj la libro estas mend'ebla ĉe:

Kroata Esperanto-Ligo
Kneza Mislava 11
HR-10000 Zagreb
Kroatio

Ret'adreso: esperanto@zg.tel.hr

Pri la ceteraj lingvoj donas adreson la supra Kroata Esperanto-Ligo.

SESA LEClONO

ESPERANTO EN LA RADIO

Post mia renkont'iĝo kun Paŭlo el Brazilo mia intereso pri Esperanto multe pli-grand'iĝis. Mi ne plu volis nur lerni Esperanton, mi volis ellerni ĝin. Mi parolis kun mia instruistino pri tio.

– Por bone lerni la lingvon vi devas multe legi kaj aŭskulti. Ĉiujn lingvojn oni nur tiel povas ellerni. Por aŭskulti lingvojn oni povas bone util'igi la radion.

– Ĉu ankaŭ Esperanton mi povas aŭdi en radio?

– Certe. Pluraj radio-stacioj el-sendas en Esperanto. Vi devas scii la precizan tempon kiam ili elsendas, kaj vi devas ĝust'igi vian radion al tiu elsendo.

– Kiel mi povas scii, kiam okazas elsendoj en Esperanto?

– En Esperanto-revuoj estas hor'aro de Esperanto-elsendoj. Mi sur-paper'igos por vi tiujn informojn. Oni povas aŭskulti Esperanton ankaŭ en Interreto. Vi devas havi la ĝustan ret'adreson. Ekzemple: http://www.radio.com.pl/polonia/esperanto_eo.asp

Iun vesperon mi aŭskultis: “Karaj aŭskult'antoj, bonan vesperon!” Tio estis vere elsendo en Esperanto! Multajn vortojn mi ne komprenis. Mi ne havis tempon serĉi en vortaro ne-kon'atajn vortojn. Poste oni ek-ludis Esperanto-muzikon. Mi komprenis, ke multaj kant'istoj kantas en Esperanto. Mi tute ne sciis, ke ekzistas tiom multa muziko en Esperanto. Tio estis mia unua renkont'iĝo kun Esperanto-muziko. Mi lernis la nomojn de kantistoj kaj ensembloj: **JoMo, Kajto, Persone**.

Mi aŭskultis kompakt'diskojn, mi fartis tre bone. Mi havis la senton, ke ie mal-proksime iu pensis pri mi, parolis kaj kantis al mi.

NOVAJ VORTOJ

elsendi
 pluraj
 kaseto

preciza
 radio
 revuo
 Svislando
 ĝusta

LA ĈEF'LANDO DE ESPERANTISTOJ EN 2003

En majo 2001 la loĝ'ant'aro de Svedio konsistis el 8.888.888 homoj laŭ la Statistika Centra Buroo¹. La plejmulto loĝas en la suda parto de la lando.

Pro la oblong'eco² de Svedio (1574 km) la klimato³ kaj naturo malsimilas de nordo al sudo. Norde troviĝas arbaroj kaj mont'aro. Tie la vintroj estas pli longaj kaj malhelaj, sed en junio kaj julio la suno neniam sub-iras (nokto-meza suno). Sude ni havas eben'ajojn, arbarojn kaj ĉie – lagojn. Fakte, 9% de nia lando estas akvo.

Svedio estas konstitucia⁴ monarkio⁵ kun parlamenta formo de regado. La reĝo, de-post 1973, *Karlo la XVI-a Gustavo* plen'umas nur ceremoniajn funkciojn kiel ĉefo de la ŝtato.

La sveda valuto nom'iĝas *krono*. Unu krono (SEK) dividiĝas en 100 oerojn. La valoro estas proksimume 1.00 EUR egalas 9.50 SEK.

Svedio havas 12 mondajn heredaĵojn⁶. La plej norda estas *Laponio*, unu el la lastaj vastaj sovaĝ'ejoj en okcidenta Eŭropo. La plej suda estas la milit'ŝipa urbo *Karlskrona* kun mara ag'ado de la 18-a jarcento ĝis la nuna tempo. Antaŭ kaj post la Universala Kongreso (UK) estos ekskursoj al almenaŭ tri mondaj heredaĵoj, inter ili al la mondfama kupro⁷-min'ejo en *Falun*, kie



de la 11-a jarcento oni el-rompas ercon⁸ kaj produktas ruĝan farbon⁹ el dis-er'iĝ'ita piritro¹⁰. Pro tio la plimulto de la svedaj lignaj, kamp'araj domoj estas ruĝaj.

Dum jarcentoj Svedio eksportadis¹¹ metalojn kaj lignon. Hodiaŭ la eksporto konsistas el maŝin-produktoj, al kiuj lasta-tempe aldon'iĝis nova kampo – muziko. La populara grupo *ABBA* ĝuis grandan sukceson mond'skale. Du el la membroj, nome *B. Ulveaus* kaj *B. Andersson*, daŭre komponas¹² kaj surscen'iĝas muzikajn teatr'ajojn. La dueto¹³ *Roxette*, la grupo *Europe* estas aliaj svedaj muzik'istoj, konataj en- kaj ekster-lande.

Famaj svedoj estas ekzemple *Sankta Birgitta*, la sankt'ul'ino de la 14-a jarcento, *Carl von Linné*, la patro de botaniko¹⁴, *Jenny Lind*, la sveda najtingalo¹⁵, kiun *H.C. Andersen* sen-espere amis, *Kristina Nilsson* kaj *Birgit Nilsson* estas du aliaj mondfamaj am'ataj sopranoj¹⁶,

August Strindberg, la verk'isto, kiu meritis, sed neniam ricevis la Nobel-premion, *Alfred Nobel*, industriisto kaj invent'isto, kiu per sia donaco kaj testamento ĉiu-jare igas la mondon turni sian atenton al Svedio.

La dua urbo laŭ grand'eco en Svedio estas *Gotenburgo*. *Stokholmo*, la ĉef'urbo jam gast'igis UK du foj-ojn, en 1934 kaj 1980, kaj la tria urbo, *Malmö* unu-foje, en 1948.

Ven'ont'jare, por la kvara fojo, Svedio bon'ven'igos la esperantistojn de la mondo al sia granda haven'urbo, *Gotenburgo*.

La esperanto-mov'ado en Svedio

has longan historion. La unua lerno-libro por svedoj en la Internacia Lingvo aperis jam en 1889. Ĝi vekis grandan intereson kaj, sekve, en la komenco de la 1890-aj jaroj Svedio okupis la trian lokon laŭ la nombro de esperantistoj. Nur en Rusio kaj Germanio estis pli. Kreskis la intereso kaj multe helpis la sistemo de vesperaj kursoj. Tio aparte gravis por la labor'istoj, kiuj ne havis ebl'econ studi en lernejoj. Post la dua mond'milito la socia vivo ŝanĝ'iĝis. La televido ŝanĝis la socian vivon en Svedio. Oni ko-



mencis vojaĝi eksterlanden, studi la anglan lingvon en lernejoj, kaj la intereso por Esperanto mal-kreskis. Nun-tempe, ĝoj'ige, ni notas, ke la ge-jun'uloj komprenas, ke la angla lingvo ne estas la sola, ĉie-uz'ebbla rimedo de la komunik'ado. Post nia membr'iĝo en *Eŭropa Unio* la lingvo-problemo iĝis pli aktuala.

En la 20-a jarcento multaj enmigr'intoj venis al Svedio kaj ŝanĝis la socion. Antaŭe, ĉe ni vivis ĉefe svedoj, sameoj aŭ finnoj. Kaj nun – homoj el multaj landoj kun kulturoj, tradicioj kaj religioj por ni fremdaj. Ni volas kompreni, ke ili ne estas minaco, sed ke ili riĉ'igas nin per siaj konoj.

La loĝ'antoj de la nordiaj landoj estas fervoraj konsum'antoj de kafo, malgraŭ ke ni ne povas kultivi¹⁷ kafon en niaj malvarmaj landoj. Averaĝe¹⁸ ni trinkas po 4,4 tasojn da kafo tage, aŭ alie, ni konsumas po 9 kg da kafo jare. Kafo estas trink'aĵo, kiu vigl'igas homojn kaj, krome, havas simbolon de bonveno. Por la unua fojo kafo estis import'ita¹⁹ al Svedio, ĝuste al *Gotenburgo* en la jaro 1685.

Bonvenon! Kafumu kun ni!

Anita Bergh kaj Kaisa Hansen,
SVEDIO

1. administra centro pri la socio cifere esprim'ebla / 2. oblonga: ovo-forme longa / 3. vetera kondiĉ'aro / 4. konstitucio: la plej grava leĝ'aro de ŝtato / 5. ŝtato reg'ata de reĝo / 6. hav'aĵojn ricevitajn de antaŭ-uloj / 7. ruĝa metalo (Cu) / 8. metal'ŝtonon / 9. kolor'ig'ilon / 10. FeS₂ / 11. vendis al ekster-lando / 12. verkas muzikon / 13. kompon'aĵo por du voĉoj aŭ muzik'iloj / 14. scienco pri kresk'aĵoj / 15. speco de kant'birdo / 16. la plej altaj vir'inaj voĉoj / 17. kultur'kompon / 18. mez'nombro / 19. en-port'ita el eksterlando.

Kara amiko, ne forgesu, ke eblas ek-partopreni en nia kvizo-ludo post ioma ajn turniro. Informu viajn kon'atojn pri la ebl'eco kaj al-tiru konkurs'ontojn!

La regularon vi trovas en la numero: n-ro 1/02 (100), marto 2002, p. 20.

Kompletajn listojn vi trovas en nia hejm'paĝo. Vizitu ĝin, ni petas:

www.junaamiko.inf.hu

Post tri turniroj ĉe la pintoj staras la subaj konkursantoj:

1-a kategorio: *Ana Milković, HR: 70,5 p.; Monika Tunjić, HR: 69,5 p.*

2-a kategorio: *Samanta Čajić kaj Marina Milković, HR po 79 p.; Rušmar Uglješa, HR: 73,5 p.; Ivana Bekavac, HR: 72,3 p.*

3-a kategorio: *Maria Molnár, HU: 84 p.; Lenče Efremova, MK: 82,5 p.; Svijetlana Akik, HR: 79 p.*

En Interkulturaj Klasoj (IK) ĉe la pinto troviĝas: *Bazlernejo Dragutin Domjanić, HR kaj Bazlernejo Medvedgrad, HR (1a kategorio).*

Kviz'em'uloj, fonda klubojn!

Por inter-proksim'igi niajn leg'antojn kaj konkurs'antojn ni proponas al vi fondi klubojn. Ili povas ek-esti kun du ĝis kvin geamikoj, kiuj kolektive solvas niajn kvizojn.

Povas form'igi ankaŭ internaciaj ret-kluboj.

La nomoj de la kluboj kaj klub'anoj aperos en nia hejm'paĝo (www.junaamiko.inf.hu) kaj, de tempo al tempo, ili ricevos de la redakcio apartajn task'etojn.

Amuzu vin en amika rondo uz'ante Esperanton!

La redakcio de Juna Amiko

La plej lertaj solv'intoj de la septembra numero (Redaktis kaj korektis: Dieter BERNDT, Germanio)

1-a kategorio:

Veronika Dobran, HU 22 p.

Kirsi Tauriainen, FI 20 p.

2-a kategorio:

Samanta Čajić, HR 23 p.

Marina Milković, HR 23 p.

Petra Ilinić, HR 22 p.

Uglješa Rušmar, HR 20 p.

Ivana Bekavac, HR 20 p.

3-a kategorio:

Maria Molnár, HU 28 p.

Lenče Efremova, MK 27 p.

Svijetlana Akik, HR 23 p.

I. Pavlinić-Bartol, HR 23 p.

Ekaterina Popovicu, RO 23 p.

- | | | |
|----|--|-------------|
| 1 | Klar'igu al ni la vorton <i>vintro</i> . | (2 poentoj) |
| 2 | Uz'ante la radikon <i>neĝ-</i> faru almenaŭ ses vortojn. | (3 poentoj) |
| 3 | Diru per unu vorto: <i>malvarmo, kiu glaciigas akvon</i> . | (2 poentoj) |
| 4 | Nomu kvar vintro-sportojn. | (4 poentoj) |
| 5 | Kion ursoj, meloj ¹ kaj gliroj ¹ faras dum vintro? | (2 poentoj) |
| 6 | Komplet'igu la proverbon: <i>Neĝo kaŝas ĝis...</i> | (4 poentoj) |
| 7 | Kiu mam'besto estas blanka vintre kaj bruna somere (en nordo)? | (2 poentoj) |
| 8 | Kia povas esti neĝo? Donu tri adjektivojn ² ! | (3 poentoj) |
| 9 | Kiel nom'iĝas en Esperanto la festoj, kiuj okazas la 25-an, la 31-an de decembro kaj la 1-an de januaro? | (3 poentoj) |
| 10 | En kiu lingvo verkis Runeberg, la nacia poeto de Finnlando? | (2 poentoj) |
| 11 | Kiu verkis la novelon <i>Neĝa blov'ado</i> ? | (3 poentoj) |

La solvojn sendu al: *Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi, Finnlando*
Ret'adreso: <saliko@jymy.kase.fi>

1. ne grandaj mam'bestoj, uzu vort'aron / 2. a-vortojn.

Solvoj de la antaŭa numero (n-ro 3)

1. en Esperanto; en espero ke...
2. kiel, kial, neniam / iam
3. koro, kuri, karbo, karto, korto, korbo, kurba, kurento, kero*
4. La frazo estas korekta, senerara.
5. En la ĉambro mi donis al la infanoj po du fragojn. En aŭtuno la avino donacis al la genepoj po 10 eŭrojn.*
6. *cikonio, leopardo, kapreolo, krokodilo*
7. di'am'anto: diamanto
8. Ekzistas diversaj respondoj.
9. *Jorge Amado, Castro Alves, Machado de Assis, Lima Barreto, Rui Barbosa, Ziraldo, Raquel de Queirós, Clarice Lispector...*
10. Mensogo. Blankaj ursoj vivas nur ĉe la norda poluso.

* Ekzistas ankaŭ alia(j) ĝusta(j) solvo(j).0

BESTOJ KUN KALKUL'KAPABLO



Oni diras, ke iu observ'ema¹ homo — dezir'ante veni al sen-duba konkludo² pri kalkul'ado, kiun iuj bestoj kapablas fari ĝis kvin sen eraro — ripetis plur'foje sian eksperimenton³.

Jen kion li faris. Rimark'inte, ke korvoj⁴ neniam re-venas al siaj nestoj, kiam iu trov'iĝas proksime, li konstruis lignan dom'eton je malgranda distanco.

La unuan tagon, la scienc'isto en-ir'iĝis unu homon en la dometon kaj rimarkis, ke la korvoj re-venis al la nesto nur post kiam la homo el-iris el la dometo.

La duan tagon, li faris alian eksperimenton per du homoj. La korvoj denove ĝis-atendis la for-

iron de la du homoj antaŭ ol enest'iĝi.

La sin-sekvajn tagojn ĉio same okazis per tri, kvar kaj kvin homoj.

Tiuj eksperimentoj klare montris, ke la korvoj nombris — evidente laŭ sia maniero — la homojn ne nur kiam ili eniris, sed ankaŭ kiam ili eliris.

Sed ĉe ses homoj, la afero ŝanĝ'iĝis, la korvoj “mis-kalkulis” — ĉar la kalkulo fariĝis por ili tre mal-simpla — kaj re-venis nesten sen percepti⁵ la ĉeeston de kelkaj homoj en la dometo.

Ankaŭ hundoj kaj elefantoj estas same kalkulkapablaj. Oni scias pri simio⁶, kiu lernis nombri ĝis kvin. Ĝi loĝis en la bestoĝardeno de Londono.

Tiu percepto, kiun la bestoj havas por malgrandaj kvantoj, povas esti nom'ata **nombra senc**o. Tio ekzistas ankaŭ ĉe la homo kiu, krom tio, uzas kalkul'rimedojn por kontroli⁷ pli altajn valorojn, ĉar homo havas inteligenton⁸ pli dis-volv'ig'itan.

Evandro de Freitas, Brazilo

1. observi: daŭre rigardi por esplori / 2. fina sekvo de pens'ado / 3. scienca provo / 4. birdoj kun nigra plum'aro / 5. en-preni en la konscion / 6. hom'simila besto / 7. esplori la ĝust'econ de io / 8. saĝon, vigan penso-kapablon.

Adiaŭ, kara s-ino Charlotte KOHRS

kiu long'tempe estis nia kun-labor'anto!

Eble vi konas la apudan kanton (kant'atan laŭ la franca melodio¹ "Frato Ĵakvo"):

Tiujn vortojn verkis s-ino Charlotte Kohrs [Ŝarlot Korz]. Ŝi loĝis en San-Diego, Kalifornio en Usono. Ŝi mortis la 31-an de Julio 2002. Ŝi vivis 92 jarojn.

Charlotte komencis lerni Esperanton post la morto de sia edzo, kiam ŝi havis 72 jarojn. Ŝi volis instrui Esperanton al ĉiuj infanoj en la tuta mondo. Por fari tion, ŝi verkis libr'etojn kaj kantojn aparte por infanoj. Ŝi ankaŭ star'igis novan organiz'ajon *INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO (ICLM)* kun speciala revu'eto por infanoj. La libretoj kaj la revueto havis desegn'ajojn far'itajn de infanoj. Ŝia revo² estis, ke la infanoj, kiuj uzas Esperanton, iam kun-igos ĉiujn homojn tra la tuta mondo en unu familian komun'umon.



Charlotte kun sia nepo

*Sur la Tero, bela Tero
Loĝas ni, kantas ni,
Kune sur la Tero,
Monda familio,
Famili', famili'.*



Dum la lastaj jaroj de sia vivo, Charlotte ne plu povis fari tiom, kiom ŝi volis. Nun aliuoj devos instrui Esperanton al infanoj sen ŝi. Tamen ŝi ankoraŭ helpas nin lerni Esperanton per siaj libretoj kaj kantoj. Ili estas ŝiaj daŭraj donacoj al la infanoj de la mondo.

Por akiri informon pri ili, vidu la ret'paĝon <www.edukado.net> aŭ la novan retpaĝon por *Infanoj Ĉirkaŭ La Mondo* <www.ICxLM.org>. Oni povas mendi la libretojn kaj kasetojn

de UEA en Roterdamo aŭ de <rglossop@siue.edu> en Usono. Por kelkaj sen-pagaj ekzempleroj³, skribu al *Ronald Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings MO63136, Usono.*

Ŝia vivo ankaŭ instruas al ni gravan lecionon: se oni havas noblan⁴ ideon, oni povas ĝui bonan vivon kaj fari multe por homoj tra la tuta mondo, eĉ kiam oni ne plu estas juna persono.


Ronald Glossop, Usono

1. sin-sekvo de tonoj agrablaj por la oreloj / 2. imago pri io bela kaj feliĉa / 3. pres'itaj pecoj / 4. hom'aman, bon'intencan.

Pri-pensoj de ne-decid'ema lernanto


Mi timas. Ekzistas du eblecoj. Aŭ morgaŭ ni skribos ekzamenon pri matematiko, aŭ ne. Se ne, estos *ĉio en ordo*. Se ni ĝin skribos, ekzistos du eblecoj. Aŭ mi ĝin kaŝkopios de mia najbaro kaj mi ricevos bonan noton¹, aŭ ne estos ebleco kaŝkopii ĝin. Se mi kaŝkopios ĝin kaj ĉio bone finiĝos, *ĉio estos en ordo*. Se mi ne sukcesos kaŝkopii ĝin, ekzistos du eblecoj. Aŭ la instruistino perdos ie la foliojn aŭ, bedaŭr'inde, ne perdos ilin. Se ŝi perdos ilin, *ĉio estos en ordo*. Sed se ŝi ne perdos ilin, ekzistos du eblecoj. Aŭ ŝi kompatos min kaj ne donos al mi malbonan noton, aŭ ŝi ne kompatos min. Se ŝi kompatos min, *ĉio estos en ordo*. Sed se ŝi ne kompatos min kaj donos malbonan noton, ekzistos du eblecoj. Aŭ ŝi informos pri tio miajn gepatrojn, aŭ ili ek-scios nenion. Se la gepatroj tion ne ekscios, *ĉio estos en ordo*. Sed se ili inform'iĝos pri tio, tiu-okaze ekzistos du eblecoj. Aŭ ili bat'punos min kaj mal-permesos al mi televidi, aŭ ili ne batos, nur riproĉos min. Se ili nur riproĉos min, *ĉio estos en ordo*. Sed se ili mal-permesos al mi televidi, ekzistos du eblecoj. Aŭ mi akceptos tion, aŭ mi ribelos². Se mi akceptos la punon, *ĉio estos en ordo*. Sed se mi ribelos, ekzistos denove du eblecoj. Mi for-kuros nokte el la domo kaj nokto-meze telefonos al la ge-

patroj kaj demandos, ĉu ili ŝanĝis sian opinion. Se ili ŝanĝis sian opinion kaj denove permesos al mi televidi, *ĉio estos en ordo*. Sed se ili ne ŝanĝis sian opinion, estos du eblecoj. Aŭ mi re-venos hejmen aŭ mi tra-noktos ie ekstere. Se mi re-venos, *ĉio estos en ordo*. Se mi tra-noktos ekstere, ekzistos du eblecoj. Aŭ en la nokto estos malvarme kaj



mi malvarm'umos, aŭ mi trans-vivos la nokton sana. Se mi trans-vivos la nokton sana, *ĉio estos en ordo*. Se mi malvarmumos, ekzistos du eblecoj. Aŭ mi reiros hejmen kaj

pardon'petos, aŭ mi restos plu ek-
stere. Se mi reiros, *ĉio estos en or-
do*. Se mi restos ekstere ekzistos du
eblecoj. Aŭ mi re-san'iĝos aŭ la mal-
sano mort'iĝos min. Se mi resan-
iĝos, *ĉio estos en ordo*. Sed la mal-
sano povos mortigi min. Tial ekzis-
tas du eblecoj. Aŭ morgaŭ mi vi-
zitos la lernejon, aŭ mi ne vizitos
ĝin. Se mi ne vizitos ĝin, mi savos
mian vivon kaj *ĉio estos en ordo*.
Sed se mi vizitos la lernejon, ekzis-
tos du eblecoj. Aŭ ni skribos ekzame-
non pri matematiko, aŭ ne. Se ne,




ĉio estos en ordo. Sed se ni skribos
ĝin, tiam ekzistos du eblecoj...

El la ĉeĥa tradukis: *Dieter BERNDT*

1. takso-cifero en lernejo / 2. intence kon-
traŭ-agos.

ENIGMO



1. Rigardi programon;
2. Preni kun si;
3. Indiki;
4. Iri per aŭtomobilo, ekzemple;
5. Maten'iĝo;
6. Novelo;
7. Verk'into;
8. Ku'eti.

Solv'inte la enigmon, en la grizaj kvadratoj, vi trovas la *titolon de du-monata revuo de TEJO*, kiun ni ĉiu-numere rekomendas al junaj progres'intoj.

Mendu ĝin ĉe UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando / Ret'adreso: *uea@inter.nl.net*) **por la jaro 2003!**

Rekomendu ĝin ankaŭ al viaj amikoj-esperantistoj.

INTERNACIA **REVUO**
PEDAGOGIA

Por ricevi prov'ekzempleron, skribu al la redaktoro: *Jozefo Németh*, Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario.

Por niaj detektiv'emaj leg'antoj



Sinjoro Anand estis la nokta deĵor'anto¹ en la hotelo *BIMA*. Je la 2-a horo nokte, li levis sin de malantaŭ la tablo por iom malstreĉi la muskolojn. Ĉiuj ĉambroj de la hotelo jam estis okup'itaj kaj ĉiuj gastoj ripozis en siaj ĉambroj. Tri el ili for-vojaĝos frumatene je la 6-a, tial ili jam pagis por ĉiuj servoj en la hotelo.

“Mi unue kontrolos² la enspezojn kaj poste dorm'etos iom”, pensis s-ro Anand. Li sum'igis, do, la enspezojn kaj trovis, ke en la monkesto devas troviĝi 631 rupioj³. Dum li ord'aranĝis la mon'biletajn, li rimarkis, ke unu el la *100-rupiaj biletoj mal-similas al la aliaj*. Ĝi estis iom-ete pli mal-hela. Li zorge ekzamenis ĝin kaj

trovis, ke ĝi estas *falsa*. Liaj manoj trem'etis dum li telefonis al la loka polic'ejo.

Baldaŭ *al-venis inspekt-Bisto⁴ s-ro Das* kun alia sinjoro, kiun li prezentis kiel spert'ulon pri fals'ajoj. Kiam Anand montris la koncernan monbiletan, la inspektisto demandis, ĉu li memoras, kiu ĝin donis al li. Anand sen-hezite respondis: “Ne, mi ne precize memoras la personon, sed mi povas lim'igi la nombron de la suspekt'atoj⁵. En la kaso 14 rupioj de-venas de la vend'itaj ĵurnaloj, poŝtmarkoj kaj bild'kartoj. La rest'ajo estas la pagoj de la tri for-ir'ontaj sinjoroj: *Rana, Ŝa kaj Lal*. La kostoj de Rana estis 219 rupioj kaj tiuj de Ŝa kaj Lal estis respektive⁶ 124 kaj 224 rupioj.”

MEZ-EŬROPO ESTAS MIA HEJMO

De la 31-a de aŭgusto ĝis la 8-a de septembro 2002 okazis renkontiĝo de mez'lernejanoj de la projekto *Mez-Eŭropo estas mia hejmo* en urb'eto *Kostrena* apud la kroata haven'urbo *Rijeka*. La renkontiĝon financis *Ministerio pri Eŭropaj Integriĝoj de Kroatio*.

En la urbo kun-venis 15 mezlernejanoj el kvin landoj: Aŭstrio, Bavario, Ĉeĥio, Kroatio kaj Pollando. Ili diskutis pri sia historio ek-de pra-tempoj (Romio kaj Bizanco) tra la mal-hela mezepoko ĝis Aŭstrio-Hungario kaj la moderna Eŭropo. Ili konstatis, ke – kompar'ante lerno-librojn – en ĉiu lando oni lernas la historion en alia maniero.

Ĉiu-tage okazis kursoj de la germana, ĉeĥa kaj kroata lingvoj, dank' al kio la partopren'intoj scias almenaŭ legi la menciitajn lingvojn.

Niaj polaj amikoj preskaŭ ĉiu-vespere prezentis teatr'ajon en Esperanto, kaj estas interese, ke la ĉefa aktoro, *Adam Tylicki* aĝas nur 12 jarojn.

La geknaboj faris ekskurson al *Rijeka* (kiu estas el-iro al la maro por, ekzemple, Hungario, Ĉeĥio, Slovakio, Aŭstrio) kaj al *Opatija*, turisma centro de Adriatiko.

La projekto al-tiris grandan atenton de radio, televido kaj gazet'aro. Ni esperas, ke en la jaro 2003 kunvenos pli da mezlernejanoj el ĉiuj landoj de Centra Eŭropo. Bon'volu anonci vin ĉe Darko Blažić (esperanto@zg.tel.hr).

Darko Blažić, Kroatio

“Ĉu ili ĉiuj pagis al vi per 100-rupiaj monbiletoj?” demandis la inspektisto.

“Jes, s-roj Rana kaj Lal pagis aparte, per *po du 100-rupiaj monbiletoj* kaj la ceteron per mon'eroj, dum s-ro *Ŝa pagis per 100-rupia bileto* kaj la restan sumon per monero. Tio, kio ĝenas min estas, ke mi ne tuj rimarkis, ke unu el la monbiletoj estas falsa. La diferenco estas, ja, rimark'ebla,” bedaŭris Anand.

La inspektisto fingro-montris unu el la tri nomoj en la registra libro kaj demandis: “En kiu ĉambro li estas? Li ŝajnas la plej suspekt'inda. Mi deziras paroli kun li.”

Kiun homon la inspektisto suspektis? Kial?

SOLVO

La inspektisto suspektis s-ron Ŝa, ĉar li estis la sola gasto, kiu pagis per unu sola 100-rupia monbileto. Se Anand vidus la falsan monbileton kune kun la aliaj biletoj, li certe estus rimark'inta la diferencon.

1. deĵori: plen'umi servojn dum difin'ita tempo-daŭro / 2. detale esploras, ĉu ĉio estas en ordo / 3. rupio: hinda mon'unuo / 4. kaŝpolic'isto / 5. suspekti: sen pruvoj duon'kredi / 6. laŭ-vice responde al la koncernaj personoj aŭ aĵoj.

VERDA PAĜO

FAKTOJ KAJ ARGUMENTOJ PRI ESPERANTO

Tiu ĉi rubriko servas niajn nov'ulojn. Oni ofte metas al ni demandojn, kiujn – pro manko de sufiĉaj spertoj – estas malfacile respondi, konvinke re-bati. Ĉi tie ni deziras liveri utilajn faktojn kaj argumentojn.

Lingvo ne povas esti arte-far'ita

Ĉiu nun-tempa lingvo estas ĝis certa grado artefarita. Pensu pri tiuj, kiuj grave kontribuis¹ al la estiĝo de tiu aŭ alia moderna² literatura lingvo. En ĉiu lingvo multaj vortoj, eĉ kelkaj gramatikaj formoj estis kre'itaj kon-

scie dank' al iu(j) fama(j) persono(j).
Ali'flanke, Esperanto en-havas multajn elementojn³ de ekzist'antaj lingvoj.

Pensu, ekzemple, pri la plej-multo de niaj vort'radikoj. Ili estas ne el-pens'ajoj, kiel imagas multaj eksteruloj, sed grand'parte vortoj, kiuj internaci'igis (*evolui, fotografi, vidi, kulturo, muziko, sporto, fantazio, benzino, rozo, hotelo, elefanto, tulipo, pompa, aŭtomata, impertinenta, nulo, mil, miliono...*). Naŭdek procentoj⁴ de nia vort'aro baziĝas⁵ sur tiu de hind'eŭropaj lingvoj.

Konscia inter-veno ne mal-riĉigas Esperanton. Ĉu tio donas ian

logikan pluson al la angloj, ke en ilia lingvo oni devas parker'igi ne-regulajn formojn kiel *man / men, good / better / best, go / went, is / was* kaj mult'egajn aliajn? La regul-eco de la vort'far'ado ebl'igas al ni

formi novajn vortojn kun plena certeco pri la ĝust'eco: *amiko, malamiko, amika, amike, amikino, amikina, gemikoj, senamika,*

Esperanto ne estas artefarita, sed farita kun granda art'emo.

amikeco, amikiĝi, amikigi, reamikiĝi, interamikiĝi, reamikigi kaj aliajn. Mi sci'volas, en kiom da lingvoj oni povas, ekzemple, esprimi per unu-sola vorto nian '*boamiko*'.

Dank' al tiu ĉi sen-escept'eco, artefariteco, nia lingvo estas rapide kaj bone al-prop'r'ig'ebla kompare al la naciaj lingvoj. Ni estus kompletaj⁶ mal-saĝ'uloj, se ni blinde sekvus la ekzemplon de la naciaj lingvoj kaj intence mal-facil'igus Esperanton, konsci'ante ke la malfacil'ajoj al-portas nenian efektivan utilon.

Se vi havas demandon, proponon aŭ alian opinion, skribu al ni, ni petas.

1. donis sian talenton al / 2. nun-tempa / 3. konsist'igajn erojn / 4. % / 5. konstru'iĝas / 6. sen-manke plenaj.

Fariĝu PATRONO DE JUNA AMIKO!

Kara kaj fidela leganto, ni turnas nin al vi kun peto:

Helpu al ni varbi almenaŭ unu novan abon'anton el inter viaj en- aŭ eksterlandaj amikoj. Ĉi-jare oni povas aboni laŭ la malnova tarifo (serĉu viajn landajn peranton kaj abon'prezon en nia hejlm'paĝo: www.junaamiko.inf.hu ĉe sub-titolo: *perantoj*), post la 31-a de decembro laŭ la nova, ĉi-suba tarifo.

Se vi informos la redaktoron (adresoj ĉi-sube) pri via sukcesa varbokampanjo, via nomo aperos en niaj revuo kaj hejmpaĝo!

Anticipe dankas pro la helpo

LA REDAKCIO

Abon'tarifoj de Juna Amiko por la jaroj 2003-04

	EUR /USD	2-4 ekz.	Ekde 5 ekz.	Prioritate
Tarifo 1	12	po 8	po 6	+30 %
Tarifo 2	6	po 5	po 4	+30 %
Hungario	800 HUF	650 HUF	500 HUF	—

juna amiko

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

29-a jaro, n-ro 4 (103), 2002

Aperas 4 fojojn jare

Hejlm'paĝo de la revuo: www.junaamiko.inf.hu

Redaktoro: **Géza KURUCZ** (Hitel u.10.fszt.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario)

Retadreso: suli267@szeged.sulinet.hu

Vicedaktoro: **Stefan MacGill** (retadreso: stefan.macgill@galamb.net)

Administranto: **Sándor Hideg**. Szendrey u.19, HU-2016 Leányfalu, Hungario

Retadreso: juna.amiko.adm@posta.net

Eldonanto: ILEI, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

Lingva revizianto: **Baldur RAGNARSSON** (Islando)

Kunlaborantoj: **s-ino Raita Pyhälä, Anja Karkiainen** (Finnlando), **Baldur Ragnarsson** (Islando), **Tatjana Auderskaja** (Ukrainio), **s-ino Jennifer Bishop** (Aŭstralio), **Zoran Ćirić** (Jugoslavio), **s-ino Saranath** (Hindio), **Gennadij Basov** (Rusio), **Bardhyl Selimi Mezin** (Albanio), **Till Dahlenburg, Dieter Berndt** (Germanio), **Pekim Tenorio Vaz, Evandro de Freitas** (Brazilo), **Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz** (Hungario), **Marija Belošević** (Kroatio), **Michel Nkwirikiye** (Tanzanio), **Eugenia-Ecaterina Popoviciu** (Rumanio), **Mensah B. Attiogbe-Agbemadon** (Togolando), **José J. Campos Pacheco** (Kubo), **Vesa Pölkki** (Finnlando).

Grafikistoj: **Irina Nagy** (Rumanio), **Monika Molnár** (Hungario), **Pavel Rak** (Ĉeĥio)

Komputila kolora tekniko: **János Bakk** (Hungario)

Farita en Presejo Saluton

Chinoiu u.20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1318

ĈAMBRO antaŭ ENLIT'IĜO

